# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

10a jarkolekto n-ro 3
marto 1990

## JARRAPORTO 1989.

Niaj lokaj grupoj organizis en tiu jaro 53 kursojn kaj tio reprezentas 1130 kursohorojn. Krome ili organizis 122 prelegojn. Ĉi tiu impona nombro ne inkluzivas la kursojn kiuj estas organizitaj en la kadro de alia organizaĵo aŭ de lingvoinstituto, kiel ekz. la oficialaj kursoj en Antwerpen ktp.
Al tio aldoniĝas multaj aktivecoj por diskonigi Esperanton, kiel partopreno en informaj borsoj, dissendo de gazetaraj komunikoj, informaj prelegoj ktp. Estas do klare ke la aktiveco de FEL koncentriĝis en la lokaj grupoj.
La centro en Antwerpen ĉefe funkciis kiel servocentro. Ni menciu i.a la disponigon de la biblioteko por esploroj. Tiel realigis en 89 5 tezoj kiuj rilatas al Esperanto.
La plej gravaa aktiveco estis la grafikaj laboroj:
Por Zairio ni presis senpagan kurson.
Esperanto-Panoramo regule aperis kaj la enhavo esence ŝanĝiĝis en la direkto de pli da vario kaj pliprofundiĝo. La nobro da paĝoj cetere kreskas en 90 al 24.
Monato denove gajnis pliajn abonantojn kaj preskaŭ atingas 2000. En la fino de 89 ni baraktis kun redakciaj problemoj pro nova posteno de Stefan Maul. Sed tiu problemo ŝajne kontentige solviĝis en la unuaj monatoj de 90 per pligranda kontribuo de la centro en la redaktado.
La Jaro plue aperis.
La eldona agado estis malpli ambicia ol en 1988. FEL eldonis i.a. "Oktavio", tradukon de Gerrit Berveling de la teksto de Seneko, "Kromosomoj", originalan romanon de Lorjak kaj la eseon "Nova Realismo" de Bruno Vogelman. Tamen la lasta eldoniĝis kun financa partopreno de la aŭtoro. Sed por 90 jam nun prepariĝas 5 verkoj.
La libroservo donis 10 % rabaton al la membroj. La vendoj sumiĝis je 800 000 fr.
En 89 realiĝis nia enketo pri la konsisto de esperantistoj kaj personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto por difini niajn celgrupojn. Sed ni ne uzis la akiritajn donitaĵojn.
FEL plue peris abonojn por plej diversaj revuoj (ekde nun ankaŭ por Budapeŝta Informilo), de kongreskotizoj, helpis por plej diversaj informpetoj kaj organizis komunan vojaĝon al la UK de Brighton.

Post tiuj mencioj de realigoj, ni ankaŭ devas relativigi la rezultojn de ĉi tiu jaro. Post la granda deficito de 1988 estas klare ke la unua zorgo de la estraro estis la grafikaj enspezigaj servoj anstataŭ la informado kaj porpagando. Tamen FEL partorpenis en la alternativa libroborso en Antwerpen kaj disponigis materialon por la lingvofoiro en Bruselo. Ĝi ankaŭ disponigis informan materialon al la grupoj je duona prezo. Sed tio ne malhelpis ke la eĥo

de Esperanto sinkis en la lastaj jaroj. En 1986, en la centro, ni ankoraŭ pritraktis pli ol 800 informpetojn kaj en 1989 nur 115. Simila tendenco vidiĝas ĉe la eĥo en la amaskunikiloj: en 1987 191 eroj kontraŭ 75 en 1989 (tamen nekompleta statistiko). La nombro da membroj falis de 799 en 87 al 634. Ankaŭ la nombro de membroj de UEA kaj de abonantoj de Esperanto malpliiĝis. La gazetaraj komunikoj, kiujn ni dissendis kelkfoje en la jaro de el la centro apenaŭ havis eĥon en la gazetaro. Feliĉe la grupoj bone funkciis, kaj tio precipe videbliĝas en la granda kvanto da kursoj.

Tiu situacio certe estas pensiga. Post la provoj de la jaroj 86-87 por trovi unuecon en la ekstera apero de Esperanto kaj dediĉi monon kaj tempon al tio, la politiko de la estraro nuntempe estas subteni laŭeble la agadon de la lokaj grupoj. Unuflanke ni daŭre provas plibonigi la financajn rezultojn de la centro en Antwerpen, kun la espero por povi doni pli al la grupoj. Ni daŭrigas la liveradon de informa materialo je duona prezo. Krome ni decidis ke - se pliiĝos la sumo de niaj subvencioj de la Ministerio pri Kulturo kiel promesite per la respondeculoj - tiu sumo estos distribuita inter la aktivaj grupoj. Sajnas ankaŭ al la estraro - i.a. pro la nova subenvencisistemo - ke ni devos estonte ne tiom emfazi la varbadon de novaj membroj sed stimuli la organizon de novaj kursoj kaj aliaj edukaj aktivecoj. Krom tio la centro certe devos entrepreni novajn iniciatojn por atentigi pri Esperanto. Bedaŭrinde la sekretario de FEL en 1989 akceptis tri pliajn gvidajn titolojn kaj tio certe malhelpis lian iniciatemon en FEL. Ni esperas ke la ĉeesto de militrifuzanto en la centro havigos eblecon por realigi planojn, kiuj ĝis nun ne realiĝis pro manko da tempo. Novaj sugestoj kompreneble estas bonvenaj.

La politika situacio en Eŭropo samtempe estas promesplena kaj ege danĝera. Ĝi postulas nian plenan atenton. Sendube la rilatoj kun Orient-Eŭropo fariĝos multe pli facilaj kaj oftaj. Ni devas nun maksimume eluzi la fakton ke Esperanto povas kontribui al la solvo de multaj lingvaj problemoj en tiuj rilatoj. FEL traktas kun Hungara Esperanto-Asocio pri kontrakto por peri turismon de Belgoj en Hungarion. Do se vi planas viziton al Orient-Eŭropo, ne forgesi kontakti FEL por esplori ĉu via vojaĝo ne povas kontribui al interŝanĝeblecoj, kiujn ambaŭ partioj alstrebas.

Fine mi volas ankoraŭ doni konsilon al la grupoj, kiuj nuntempe ĝuas sukceson en sia agado. En 1979, post la unua vizito de Irananoj, en 1986, pro kombino de artikolo en TV-Expres, televidelsendo kaj kampanjo "Test 5000" kaj en 1987 pro la jubilea jaro, Esperanto ĝuis konsiderindan atenton en la komunikiloj de Flandrio. Sed trifoje ni faris la saman eraron, esperante ke la sukceso aŭtomate daŭriĝas aŭ eĉ kreskos. Trifoje okazis seniluziĝo. Fine ni komprenis ke post sukceso nepre sekvas malpli da sukceso, se oni forgesas en la sukcesa momento pensi pri la venonta nova iniciato por vivteni aŭ eĉ intensigi ĝin. Mi esperas per ĉi tiu konsilo malhelpi plian malagrablan surprizon por vi.

Antwerpen, 10.3.1990.

Ivo Durwael,
Sekretario

PROTOKOLO PRI LA ESTRARKUNVENO DE FEL DE 900310

---

1. Partoprenas: Ivo Durwael (ID), Roland Rotsaert (RR), Monique Caestecker (MC), Jos Vandebergh (JV) kaj Paul Peeraerts (PP).

2. Financoj: PP klarigas ke la jaro 1989 finiĝas kiel prognozite per malgranda gajno de 60000 frankoj. Laŭ decido farita en la antaŭa kunsido, oni tamen en 1989 deskribis la jam delonge pendantan dubindan debitoron TK/Stafeto, tiel ke la librotena rezulto de la jaro iĝas deficito de 430250 BEF.
PP proponas la buĝeton 1990 kiu strukture forte devias de la antaŭaj, ĉefe pro postuloj de AVI- kaj ministeria inspektoroj. La buĝeto estas akceptita de la estraro, tamen kun peto ke tiu estonte pli bone montru la diferencon inter vendoj de propraj eldonaĵoj kaj vendoj de alies eldonaĵoj.

3. Eldonaĵoj: En la unua duono de 1990 devus aperi kvar novaj libroj: Kuirlibro, Grammaire ABC d'Esperanto, La Fundamento sub Lupeo, La Akuzativo en Esperanto. Historia libro pri Esperanto estas ankoraŭ traktata. Eldono de kvara libro de Deck Dorval provizore ne jam estas decidita.

4. Antaŭa protokolo: akceptita.

5. Kunveno en Roterdamo: Alvenis la letero de Spomenka Stimec. La estraro principe liberigas la buĝeton por povi sendi iun al la kunveno. Ne jam estas klare kiu povos reprezenti FEL.

6. Kubaj moneroj: Estas decidite provizore ne aĉeti la Kubajn monerojn eldonotajn okaze de la UK. FEL aĉetos eventuale stokon nur post ilia apero kaj kiam estas klare, ke temas pri oficialaj moneroj.

7. Nova seruro: La estraro rekomendas al PP esplori la eblecojn instali elektran seruron kun cifera klavaro en la ĉefpordo de la oficejo. PP liveros la donitaĵojn al la estraroj de FEL kaj LVS.

8. Vojaĝoj al Kubo: FEL ne organizos komunan vojaĝon al la UK en Kubo sed rekomendos kaj eventuale peros vojaĝojn de individuoj.

9. Enketo ĉe la grupoj: ID preparis enketilon por la grupoj de FEL. La enketo okazos parole posttagmeze en la 10a de marto.

10. Lingvoborso: FEL decidas principe partopreni ankaŭ estonte en la Bruselaj lingvoborsoj, malgraŭ la fakto ke la granda plimulto de la informpetoj venas de franclingvanoj.

11. Freŝe gazetaren: Decidite estas ne plu partopreni en la borso "Vers voor de pers" ĉar la nombro da vizitantoj estas tro malgranda. PP esploros ĉu pere de anoncoj ni povas de tempo al tempo konigi nin al la librovendistaro.

12. Eŭropa asocio de verduloj ŝatus ricevi regule informojn pri ekologiaj temoj en Esperanto. La centro ĉiumonate sendos senpage la revuon "Monato" kaj indikos aparte la ekologiajn temojn.

13. Magadana Esperanto-klubo deziras organizi arteksponzicion en Belgio kaj petas la intervenon de FEL. Mankas sufiĉe multaj klaraj donitaĵoj kaj pro tio ID skribos al ili unue.

PROTOKOLO PRI LA MEMBROKUNVENO DE FEL DE 900310

---

1. Financoj: PP prezentas la spezokonton de 1989, la bilancon de 891231 kaj la buĝeton de 1990.
La tuto estas akceptita unuanime.
Kun ĝojo ni povis konstati ke la fruktoj de la granda investado en 1988 jam rikoltiĝas. Danke la novan presmaŝinon ni povis draste malaltigi la kostojn.

2. Sekretaria raporto: ID prezentas la sekretarian raporton pri 1989 (vidu aldonaĵon).
G. Jacobs (ne-membro de FEL) petas la parolon, kio estas akceptita de la prezidantino. Li atakas la fakton ke FEL, same kiel UEA kaj aliaj organizaĵoj, ne plu uzas la stelon kiel simbolon de Esperanto. ID kaj MC replikas ke tiu decido estis farita de la ĝenerala jarkunsido antaŭ tri jaroj, kaj ke la estraro ne volas ĉiun jaron remalfermi diskuton pri tiu temo.
La sekretaria raporto estis akceptita unuanime.

3. Elektoj: PP transprenas la gvidadon kaj petas la nomojn de la administrantoj, kiuj reprezentos la grupojn dum la venonta oficperiodo.

Elektitaj estas:

| | |
|---|---|
| por Aalst | Hilde Wauters |
| por Antwerpen | Dirk de Weerdt |
| | Alex Humet |
| | Iwona Kosieba |
| | Ivo Durwael |
| por Brugge | provizore vakas |
| por Brussel | ne nomumita |
| por Gent | Katja Lödör |
| por Halle | Jan Devillez |
| por Kalmthout | Edward Symoens |
| por Knokke | ne nomumita |
| por Kortrijk | Jan Hanssens |
| | Jean-Pierre Allewaert |
| por Leuven | Carl Deseure |
| por Limburg | Albert Claesen |
| | Jos Vandebergh |
| | Matthieu Habex |
| | Gustaaf Rombaut |
| por Oostende | Raymond Willeman |

Al tiuj 16 Administrantoj aldoniĝas laŭofice Paul Peeraerts (FEL), Jean Pierre VandenDaele (FLEJA) kaj Guido van Damme (Esperanto-Panorama).

La eksiĝinta estraro rajtas proponi la koopton de 6 pliaj administrantoj (unu triono de 16 + 3). Proponitaj estas Roland Rotsaert kaj Monique Caestecker. La asembleo krome proponas Marcel Aerts, Gilbert Cardoen kaj Lucien de Sutter. Tiujn 24 administrantojn la asembleo akceptas kun 1 kontraŭa voĉo kaj nul sindetenoj.

La administrantoj elektas inter si la jenajn kvin estraranojn: Roland Rotsaert, Jos Vandebergh, Monique Caestecker, Alex Humet, Ivo Durwael. Ili krome decidas ke la taskoj ene de la estraro estos disdividitaj en la venonta estrara kunsido.